

Svisa federismo, 8-a parto
Claude Gacond, 160-a radioprelego, 1966.11.02 & 1966.11.05

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond pri la svisa federismo kaj la provo federi Eŭropon.

Vi konstatis, ke nia priskribo de la kaŭzoj al la konflikto **Sonderbund** [Aparta Ligo], estis por vi pli instrua, ol la nura priskribo de la konflikto mem.

A.- La milito Sonderbund en si mem nur povas interesi svisojn. Kaj inter la svisoj nur tiujn, kiu ŝatas historion.

Cl.- Sed la studo de la kaŭzoj de la milito Sonderbund ebligas interesajn komparojn kun la kaŭzoj al aliaj konfliktoj. Tiu studo pro tio ne nur estas interesa por svisoj ŝatantaj historion, sed por ĉiuj, kiuj deziras kompreni sian epokon.

A.- Ĉiu historia evento povas esti prezentata laŭ du vidpunktoj.

Cl.- Ĉu oni kontentiĝas nur rakonti ĝin.

A.- Ĉu oni provas malkaŝi ĝiajn kaŭzojn.

Cl.- Kiam historio sinonimas al rakontado, tiam ĝi rezignas pri sia vera rolo kaj kontentiĝas fariĝi listo de kronologiaj eventoj, kiuj ŝajnas havi inter si nur hazardan tempan rilaton.

A.- Kiam kontraŭe historio provas malkovri la similecojn, kiuj ekzistas inter eventoj, sen tro okupiĝis pri kronologio, tiam ĝi ekludas sian veran rolon. Se oni malkovras, ke samaj sociaj kaŭzoj kondukas ĝenerale al simila socia situacio, tiam oni pli bone komprenas sian epokon. Tiam oni povas provi havi influon sur la sociajn eventojn de sia epoko, antaŭ ol ili kondukos al konflikto.

Cl.- Psikologio estas fako najbara al historio. Ĝi fariĝas utila ekde la momento, kiam ĝi provas malkovri la sekretojn de la homa konduto. Por tion fari, ĝi ne kontentiĝas rakonti eventojn, ĝi serĉas malkovri iliajn kaŭzojn.

A.- Konante la kaŭzojn de la eventoj, tiam psikologoj poste povas influi la eventojn mem. Oni konas la aktualan socian rolon de la kuraca psikologio.

Cl.- Kiam la historiistoj per scienca esplorado sisteme analizos la kaŭzojn de la interpopolaj konfliktoj, tiam ili certe malkovros fundamentajn historiajn leĝojn.

A.- En la libroj pri historio oni tiam ne plu pritraktos la eventojn kronologie, sed specie. Se du revolucioj donas la impreson rezulti el samaj kaŭzoj, tiam oni studos ilin per kompara metodo.

Cl.- Komparoj inter la franca kaj la rusa revolucioj alportas iom da lumo pri la cirkonstancoj, kiuj okazigas revoluciojn.

A.- Sed tiaj studoj tre maloftas.

Cl.- Kiom da fojoj oni trovas en libro pri historio komparojn inter kompareblaj militoj? Verŝajne tre malofte, por ne diri neniam! Tiu manko de komparemo inter historiaj eventoj kredigas al la legantoj pri speco de historia fataleco.

A.- Tiujn jarojn aperas grandaj verkoj pri la dua mondmilito. Kelkaj el ili rakontas detalege la okazaĵojn ekde la hitlerismo. Bedaŭrinde ili ĉiuj pritraktas kronologie la eventojn. Kiam oni fermas tiujn librojn, tiam la cerbo plenas je nomoj, datoj, statistikaj nombradoj kaj fotaj komentarioj. Sed komprenon pri la eventoj mem oni akiras nur per la interlinia legado.

Cl.- Verko pri la dua mondmilito devus provi malkovri la kaŭzojn al tiu monstra konflikto. Ĝi devus ne nur rakonti la disvastiĝon de la faŝismo, sed ekzameni la kaŭzojn de tiu socia fenomeno. Tiu verko parolus pri la incito al la ŝovinismoj kaj antisemitismo laŭ sociologia

Svisa federismo, 8-a parto

Claude Gacond, 160-a radioprelego, 1966.11.02 & 1966.11.05

vidpunkto. Ĝi ne kontentiĝus priskribi la mondan ekonomian krizon, sed serĉus ĝiajn ekonomiajn radikojn. Tiu verko devus lumigi la fuŝadon de la kreado de Ligo de Nacioj far la diplomatoj. Ĝi devus menciigi la avertojn de la tiamaj klarvidantoj, klarvidantoj ĝenerale silentigitaj de la registaroj.

A.- Tia studo pri la dua mondmilito riĉigus multe pli la legantojn, ol la oficialaj kronologiaj rakontoj.

Cl.- Ni bedaŭrinde devas paroli pri tia verko en us-formo, ĉar la historiista spirito ne ankoraŭ rigardas en tiun direkton. Nur la sociologoj havas la kuraĝon malkovri la sociajn kaŭzojn de la interhomaj konfliktoj. Pro tio instruo pri sociologio avantaĝe anstataŭus la fakon historio en la lernejoj. Tiu ŝanĝo ebligus al niaj infanoj akiri komprenon pri la homaraj eventoj, anstataŭ devi parkeri laŭ mezepoka spirito longajn listojn de romaj imperiestroj, de eŭropaj reĝoj kaj de internaciaj militoj. Tiuj faktoj ofte kaŝas la konindajn verojn.

A.- Ni dediĉis multajn elsendojn al atenta studo de la kaŭzoj de regiona svisa evento, ĉar ni havas la certecon, ke studo de tiu evento, se ĝi estas farata laŭ kompara vidpunkto, povas konduki al pli bona kompreno de multaj aliaj similaj eventoj.

Cl.- Dum nova serio da prelegoj ni parolos pri la sekvoj de la svisa sonderbunda milito. Vi ankaŭ konstatos, ke analizo de tiuj sekvoj multon instruas pri nia epoko.

A.- Antaŭ ol adiaŭi vin, karaj aŭdantoj, ni atentigas vin, ke en la nova vintra programo, kiu komenciĝos en la dua semajno de novembro, niaj vesperaj elsendoj jaŭde kaj sabate ne plu komenciĝos je kvarono post la 22-a horo, sed duonan horon poste, nome kvaronon antaŭ la 23-a horo. Bonvolu tion noti.

Cl.- Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude kaj Andrée Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-